

MALGRANDA STACIDOMO KAJ ALIAJ MIKRONOVELOJ

Miaohui tradukis en 1990

el

**Mikronovelaro "*Mi amas nur foje dum mia vivo*"
eldonita de Dingxiang-a Literatura Federacio,
Shanxi-provinco**

kaj publikigis en *Esperanta Ĝardeno*

Ĉina Budhana Retejo Esperantista

<http://www.ebudhano.cn>

miaohui@ebudhano.cn

Enhavo

Malgranda stacidomo.....	3
Grenpluvo.....	6
Ekssoldato senmedala.....	9
Vizito de Panjo.....	13
Verda Nebulo.....	16
Efiko de la Vino.....	19
Kion Mi Pentrus?	22
Fremda Titolo.....	24
Knabino aĉetadanta rostitaĵon.....	26
Teniĝo.....	28
A Liao.....	30
Strangaĵo pri la Strangulo.....	33
Bofratino Kokino.....	37
Ĉarlatandrogo.....	38

Malgranda Stacidomo

Wang Zhengyue (Ŭan Ĝenjŭe)

Portante subbrake korbon plenan de produktoj el montara regiono, li tenis saketon da juglandoj en sia mano kaj proponis siajn kratagojn, juglandojn kaj sekigitajn persimonojn al la pasaĝeroj de fenestro al alia en la vagonaro. Li aĝis nur dek tri jarojn, kaj pro malalteco li devas levi siajn kalkanojn dum komercado kun la pasaĝeroj.

Juna pasaĝero aĉetis de li saketon da kratagoj. Ĵus kiam li aldonis la kratagojn, li rimarkis, ke tiu ĉi junulo portas universitatan emblemon sur la brusto. Li do demandis kun dolĉa rideto: "Ĉu vi estas universitata studento?"

"Jes." Rigardante tiun ĉi knabon kun naive kristalaj okuloj, la junulo opiniis lin aminda, kaj respondis ankaŭ kun rideto.

"Mia frato ankaŭ vizitas universitaton en la provinca ĉefurbo. Li lernas pentrarton." Li diris ĝojplene kaj fiere. "Vi studentoj ne estas bonhava, do mi ne postulos de vi la pagon." Kun korbo sub sia brako, li ridetante staris tie. La junulo elfenestrigis la buston, rekte etendis brakon kaj svingadis la dujŭanan monbileton en sia mano. Ĝuste kiam ili ambaŭ rifuzadis la monon, malrapide ekmoviĝis la vagonaro. La junulo eksvingis la monon, la monbileto flirte falis sub la kajon kaj flugis ĝis malproksima loko sekvante la vagonaron. La knabo haste alkuris, prenis la monon, kaj staris inter la fervojoj rigardante la forvojaĝantan vagonaron, kvazaŭ iu kolerigus lin.

La stacidomo estis malgranda, kaj la pasantaj malrapidaj vagonaroj haltis ĉi tie nur kelkajn minutojn. Ĝuste por tio li alvenis de sia montvilaĝo malproksima je tri kilometroj.

Estis malvarme tiutage. Kaj neĝetis. Tio ja estis la unua neĝo ĉijare. Alvenis alia vagonaro, sed la fenestroj estis firme fermitaj. Malofte oni malfermis la fenestron, krom nur por elĵeti pomŝelon aŭ elverŝi akvon. Antaŭ ol li alproksimiĝis, la fenestro jam fermiĝis denove. De antaŭa vagono subiris pasaĝero en tute nova okcidenta kostumo kaj kun leda valizo en la mano. Li estis ununura pasaĝero subirinta de tiu ĉi vagonaro. "Jen urbano." Li tuj proksimiĝis al la pasaĝero.

"Aĉetu manĝaĵon, Kamarado. Tio ja estas tre malkara." Starante antaŭ la pasaĝero, la knabo etendis saketon da sekigitaj persimonoj kun pia mieno.

La pasaĝero subite demetis sian valizon, ekkaptis liajn glacie malvarmajn manetojn kaj krietis, "Fraĉjo!"

Malfermeginte siajn okulojn pro surpriziĝo, la knabo fiksrigardis la urbanon ŝajne iom konatan. Kiam li ekvidis la universitatan emblemon sur lia brusto, li subite rekonis lin. Li sin ĵetis en la sinon de la pasaĝero kaj ekkriis ameme: "Fraĉjo!" Larmoj eltorentis, oni ne sciis, ĉu pro lia surpriziĝo aŭ ĝojo.

Palpante la okcidentan kostumon, li demandis, "Fraĉjo, ĉu viaj kunlernantoj ankoraŭ nomas vin 'Frato Kampulo'?"

Anstataŭ respondi, la pliaĝa frato demandis, "Fraĉjo, kial vi ne lernas, sed alvenas ĉi tien?"

"Panjo malsaniĝis, kapablo mankis al Paĉjo kaj vi bezonas monon. Do panjo ne plu permesis min lerni. Ŝi diris, ke sola vi, universitata studento, ja povas sufiĉe honori niajn praavojn."

"Fraĉjo!" Li subite ĉirkaŭprenis sian frateton en la sinon. La frateto levis sian vizaĝon. "Fraĉjo, lastfoje vi skribis por peti monon. Ĝuste tiam panjo malsaniĝis kaj por aĉeti medicinaĵon, mi elspezis ĉiujn dek kelkajn jŭanojn,

kiujn mi enspezis. Fraĉjo, ĉu vi malpacientiĝis pro la atendado?"

La vizaĝo de la pliĝa frato ekruĝiĝis. La larmoj senĉese sin rulis en liaj okulkavoj. "Fraĉjo, ni iru hejmen--" Neĝis pli dense. Sur la neĝo ekaperis du linioj da piedsignoj, kiuj etendiĝas ĝis la alia flanko de la monto laŭ la zigzaga vojeto.

La Sunperiodo Grenpluvo

Zhang Xingjian (Ĝan Ŝjinĝjan)

En la norda montregiono oni ne ĝuas printempon. De la printempa festo ĝis nun, Maljuna Shuan ankoraŭ tutkorpe surportas "kotonon". Ĉi lastajn tagojn la vetero jam sufiĉe varmiĝas, kaj baldaŭ li demetos la vatitajn pantalonojn volvantajn liajn malsanemajn krurojn. Jam estas la sunperiodo Grenpluvo, ĉu vi kredas aŭ ne. Post nelonge estos la sunperiodo Somerkomenco.

Maljuna Shuan ekfosis alian pecon de kampoj. La ŝvitgutoj rampis ĉiudirekten laŭ la sulkoj sur lia vizaĝo. "Haj, hajhajhaj---" Pro la tusado, lia vizaĝo ruĝiĝis purpure, la gorĝa pomo leviĝis kaj malleviĝis dum kelkaj bluaj vejnoj elŝveliĝis sur lia kapo. Haj, la aĝo ĉiam perfidas onian volon. Kelkajn jarojn antaŭe, pluraj muoj da kampoj estis nenio por li. Li dike sternis la sterkon, pene fosis kelkajn tagojn, ordonis sian filinon alporti manĝaĵon kaj du potojn da supo el verda fazeolo en la kampojn, kaj li povis facile fini la semadon de maizo, kotono, sezamo kaj aliaj. Kiu en la tuta vilaĝo ne admiris lian lertecon, kaj des plie, lian fortecon en la kamplaboro? Hodiaŭ? La korpo estas senforta dum la deklivaj kampoj kaj la varmigebla terlito kovrita de ŝafa felo en la kaverno sorĉe allogis la maljunulojn, ke li vere volus kuŝiĝi por ĝui momentan dormon. Hum, eĉ hundoj kutime sentas sin lacaj en printempo. Li do kuŝiĝis sur la kampon kun la granda kaj osteca kapo sinapoganta al termaso.

La ĉielo bluis serene. De iu kaverna tegmento en la malantaŭa valo du strioj da fumo leviĝis kaj milde varmigis la koron de Maljuna Shuan. Li fiksrigardis la fumstriojn per siaj malklaraj okuletoj. Antaŭe, kiam lia filino ankoraŭ ne edziniĝis, li eĉ ne aŭdacis rigardi al la direkto de la

malantaŭa valo pro honto laborante kun ŝi. Li ne devis lasi la infanon elspioni kion li kovas en la koro. Hohoho, tio ja estis sengusta pasinteco kiel malnova greno...

Lia edzino mortis kiam li estis iom pli ol kvardek-jara. Tiam la filino estis ankoraŭ tre juna kaj ilia vivo estis tre malfacila. En tiu tempo la edzo de la patrino de Xiao Bao (Ŝjaŭ Baŭ) mortis antaŭ nelonge. Ili ja devus unufamiliĝi por kune teni sian vivon, tamen la vidvino ne konsentis, timante, ke tio suferigos ŝian propran infanon. Maljuna Shuan do ofte helpis en ŝia laboro kaj iom post iom gajnis la plaĉon kaj dankemon de la vidvino. Finfine la vidvino konsentis, tamen la infanoj jam sufiĉe elkreskiĝis kaj ekkomprenis pri tiaj aferoj. Do la infanoj ne volis, ke ili tiel kuniĝu. Tiel, forpasis multaj jaroj, dum kiuj la infanoj jam ekhavis siajn proprajn familion kaj infanojn, tamen la patrino de Xiao Bao restis ankoraŭ vidvino, dum Maljuna Shuan, vidvo...

La ĉielo ankoraŭ bluis tiel eksterordinare. La vento sur la leŭsa altebenaĵo blove verdigis la herbojn, arbojn kaj plantaĵojn, tamen neniel povis renigrigi la arĝentan barbon de Maljuna Shuan. Oni sentas solecon tuj kiam ili aĝiĝas. Maljuna Shuan jam sufiĉe spertis tion. Do por sin distri li nur povis okupiĝi en la peniga laborado, tamen tio ne sufiĉis. Antaŭ kelkaj tagoj la filino donis mesaĝon, ke ŝia edzo helpos lin fosi la kampojn, tamen ĝis nun li ankoraŭ ne venis. En tiu ĉi laborplena tempo, oni ne rajtas malŝpari momenton. Eĉ sian propran laboron oni ne havas sufiĉan tempon por bone fari. Ĉijare pluvos abunde. Li do esperis, ke li povos rikolti pli da kotono por iom pli enspezi en la aŭtuno. Haj, la terkultivantoj sin vivtenas per la tero kaj enspezas per la tero. Tio ja estas destino...

Maljuna Shuan elsputis salivon kaj haste eklaboris. Kun ĉiu lia movo aperadis multaj novaj esperoj. Subite li Li

subite aŭdis ian sonon de malantaŭe. Laŭ la longjara sperto li sciis, ke tio estas sono de fosilo fosanta la kampon, kaj la klingo estas tiel akra, ke ĝi detranĉas la herboradikojn susure. Li turnis la kapon kaj liaj malklaraj okuletoj tuj rigidiĝis. En la alia flanko de lia kampo Xiao Bao fosis la teron kurbiginte sian nudan dorson, dum lia patrino alpaŝis kun akvopoto, movante siajn malgrandajn piedojn. La monta vento alportis la parfuman bonodoron de supo el verda fazeolo.

Ŝajnis, ke la kampo en la koro de Maljuna Shuan estus ankaŭ fosita kaj semita ĉe la Grenpluvo...

Senmedala Ekssoldato

Ma Yaowu (Ma Jaŭ'u)

Lia koro ekstremitis nur kiam la longvoja aŭtobuso haltis en la haltejo tuj apud la pordo de la mezlernejo, kie li lernis. Li elsaltis de la aŭtobuso. Tio signifis, ke li, Zhao Qian (Ĝaŭ Ĉjan), ekssoldatiĝis. Lia senvundita korpo finfine ekstaris sur la tero de lia hejmloko. Li nek kuris, nek kriis, des malpli gaje hurlis kiel li unuafoje revenis el la antaŭa pozicio de batalo: "Revenas mi, Zhao Qian!" En lia brusto estis ia amareta feliĉo, tamen pro tia feliĉo li tute perdis sian prudenton. Ĉiuj liaj samlokanoj falis sur tiu monto dum li estis eĉ ne tuŝita de unu kuglo. Li preskaŭ eksentis bedaŭron, ke sur lia korpo eĉ ne troviĝas truo. Timante, ke lin renkontos konatuloj, li paŝis laŭ la rando de la strato. Kompare kun la rapidemaj pasaĝeroj, li tre similis al spektanto de la pejzaĝoj.

Li finfine atingis sian domon. Kompare kun lia antaŭa kaverneto, ĝi similis al paradizo. Vidinte lin, ekzaltiĝis liaj gepatroj, precipe la patrino, kiu senĉese elverŝadis sian larmon. Alvenis samvilaĝanoj por viziti lin, kiu havas eksterordinaran travivaĵon, sed ne estis tuŝita de kuglo.

Post kelkaj tagoj, ĉio revenis al sia antaŭa kvieteco. Kian profesion li povus revii de la subgubernia registaro al si, la senmedala ekssoldato? Liaj gepatroj ekprojektiis lian edziĝon dum ĉiu el la du pliaĝaj fratoj elprenis kvinmil jŭanojn por ke li sin riĉigu per la mono, promesante, ke li redonu la sumon poste. Zhao Qian, kiu spertis la neimageblan bataladon, fordankis la monhelpon de la fratoj kaj la bonkoran projekton de la gepatroj. Li volis ripozi iom da tempo por rememoradi kaj pripensadi.

Kiam li rigardis filmon ĉe la projekcia teamo, la estintaj kolegoj ridis je li, ke li estas tiel malprudenta, kaj eĉ ne povas trovi laboron dum pluraj de liaj kunlernintoj jam gajnis grandan monon. Bonintencaj mokoĵ embarasis Zhao Qian. Li vere volus denove alpreni mitralon kaj ekpafi post sia reveno. Tia sento ekvenis al li post sia intervidiĝo kun la fianĉino. Se mi dirus pli precize, do en tiu nokto, kiam li fordankis la monhelpon de siaj fratoj.

Nokte, en la hela lunlumo, li intervidiĝis kun sia fianĉino ĉe la rivereto post la vilaĝo. Li diris al ŝi, ke li fordankis la monhelpon de siaj fratoj kaj volas esti memstara. Neatendite, lin trafis la insultado: "Por kio mi fianĉiniĝis al vi? Mi estis maltrankvila kiam vi estis en la batalejo, nur por ke mi povu forlasi ĉi tien post via partianiĝo, kadriĝo, aŭ vizito al universitato. Sed kiel vi agis? vi eĉ fordonis la medalon al aliulo kaj rifuzis la monohelpon. Ĉu vi volas, ke mi satigu la ventron kune kun vi per vento? Jen kial oni nomas vin stulta soldato." La vizaĝo, al kiu li iam sopiradis senĉese en la kaverneto, nun fariĝis tiel malbela en la pala lunlumo.

La tempo forpasis kiel fluanta akvo. Zhao Qian tute ne pentis pri tio. Ĉiuj tridek homoj en lia plotono gardotenis la montpinton kaj nur postlasis ses vivaj, inter kiuj kvin estis vunditaj. Oni nur povis premii kvin el la ses, li do forlasis medalitecon. Tiu, kiu travivis morton kaj vivon, fajron kaj sangon, des pli sciis, kio estas la plej valora.

Ŝajne la bofratinoj malkontentis kontraŭ li, eble pro tio, ke li nur sin satigas kaj ne perlaboras. Dankinda estas la naturo, kiu donis al lia hejmloko belajn pejzaĝojn kaj faris ĝin fama vidindejo. Pro tio, li povis iri sur la monton por vendi teon, kuraceblan fungon kaj spice kuiritajn ovojn. Tiamaniere, li kaj povis sin enspezigi kaj samtempe sin nestigi en la ĉirkaŭpreno de la naturo por forgesi ĉiajn

ĉagrenojn kaj amarajn rememorojn, kaj ankaŭ por purigis sian animon.

La tagoj forpasis fluge, ĉar ili estis monotonaj kaj enuigaj. Iutage sur la monto Zhao Qian renkontis kelkajn soldatojn kun universitata emblemo, inter kiuj estis Li Zikaj. Ilia renkontiĝo estis drameca.

Ĵus kiam Li Zikaj aĉetis kuiritajn ovojn, li ekvidis Zhao Qian. Anstataŭ ĝojon, li nur sentis surpriziĝon kaj senesperiĝon.

"Ja... Ja estas vi, Subplotonestro! Ha, kial vi ekvendis ovojn? Kial vi ne faru alian ol ĉi tion?"

"La Subgubernia Registaro ankoraŭ ne aranĝis okupon por mi ."

"Kial vi ne diru, ke vi estis medalita?"

"Mi ja ne posedas medalon."

"Tio estas vero." Li Zikaj estis en bona sanstato, kaj li tute ne aspektis tia, ke li vundiĝis trifoje. "Vi jam fariĝis dekmilulo, ĉu ne?"

Zhao Qian ekridis, "Kiel mi kapablas por tio?"

La kamaradoj de Li Zikaj ĉirkaŭis ilin. Ili ne atendis, ke Li Zikaj havas subplotonestron vendantan ovojn. Kaj des malpli ili kredis, ke la viro antaŭ ili ja estas tiu, kiu sola mortigis 14 malamikojn kaj transdonis medalitecon al Li Zikaj.

"Eble. Komercistoj ja ne povas facile fariĝi dekmilulo."

"Mi fariĝus dekmilulo, kaj vi ja devus iri al batalejo poste, ĉu ne? Mi diru al vi veron. Mi vere dezirus interŝanĝi kun vi." Estas hontinde malestimiĝi de aliaj, kaj des pli dolorige humiliĝi de sia favorato. Zhao Qian ekpentis. Li pentis, ke li fordonis la medalitecon kaj pro tio li perdis sian propran perspektivon.

Ekde tiam, Zhao Qian fariĝis portisto. Tio estis peniga laboro, ke li devis suferi penigon je ĉiu paŝo. Tamen li sentis sin plezura. En sia koro tio donis al li la saman senton kiel li iris al la batalfronto kun municio sur la dorso.

Foje, Zhao Qian savis el valo studenton, kiu lernas en la novaĵa fako. Ili fariĝis amikoj. Restinte tri tagojn ĉe Zhao Qian, la studento revenis en la provincan ĉefurbon kaj skribis raporton kun titolo "En la profunda montaro vivas nekonata eksterordinarulo". Tio faris Zhao Qian fama en la tuta gubernio. Malgraŭ tio, Zhao Qian ankoraŭ sentis sin soleca kaj ankoraŭ sin vivtenis kiel portisto.

La estinta regimentestro (kiu nun estas divizio-komandanto) de Zhao Qian vojaĝis preter la gubernia urbo. Informiĝinte pri la malfacila situacio de Zhao Qian, li invitis lin alveni.

Tuj kiam Zhao Qian vidis sian estintan estron, li firme kaptis lian manon kaj eksplodis per vortoj: "Estro, forprenu min." Tiu ĉi heroece elokventa viro en la ĵurkunveno al batalo ne plu povis deteni siajn larmojn.

La estinta estro ĉirkaŭprenis lin en la sinon kaj diris ameme: "Bone. Mi komprenas vin." Ekster la fenestro ekaŭdiĝis la pepado de pigo.

Vizito de Panjo

Xu Shiyong (Ŝiŭ Ŝijin)

Panjo alvenis el la hejmo en la norda kamparo. Aŭdinte tion, Tang Wenzhu (Tan Ŭenĝu) tuj elklasĉambriĝis kaj kuregis al la dormĉambro.

Sin turninte al la koridoro, Wenzhu ekaŭdis babilon kaj ridon el la kontraŭa domo. Spiregante, ŝi brue malfermis la pordon. Sur du longaj tabloj amasiĝis multaj melonsemoj, arakidoj kaj piroj. Panjo sidis sur tabureto apud la tablo kun taso da vaporanta teo en la mano. Manĝante, kelkaj knabinoj babilis kaj ridis.

"Pum!" La pordo ekfrapiĝis je la muro. Ĉiuj rapide turnis la kapon.

"Wenzhu, kiel bona estas via panjo! Ŝi speciale venis por vin viziti." "Ni jam ekmanĝis unue antaŭ via reveno."

"Tio esatas de mia hejmo. Manĝu do." Salutinte al ili, Wenzhu sidiĝis sinkrociĝinte al sia patrino kaj ekridetis rigardante ŝin. Panjo estis tre okupita hejme. Tio estis la dua fojo de ŝia vizito. Vidinte sian filinon, ŝi tre ĝojis.

La patrino de Wenzhu fiksrigardis ŝin kun atentemo: Ŝi blanketiĝis, dum ŝiaj zigomoj plialtiĝis ol antaŭ du monatoj. Tufo da haroj pendis de ŝia verto kaj du "broŝetoj" estis ligitaj malantaŭ ŝia kapo. Ŝi portis iom blankiĝintan ĉinstilan kostumon el blua kakio, kiun donis ŝia patro pro ĝia mallarĝiĝo, kaj pantalonon el nigra ŝtofo. Ŝi turnis sian rigardon al la aliaj knabinoj. Ili ĉiuj havis diketajn kaj ruĝetajn vangojn; iuj havis longan haron kun granda ruĝa artefarita papilio ligita sur la kapo, kaj la aliaj havis buklian haron. Ili ĉiuj sin vestis tiel bele, ke la patrino de Wenzhu eĉ ne povis distingi la kvaliton kaj materialon de la ŝtofoj. Ŝi

nur sciis, ke tio estas treege multekosta. Ŝi opiniis, ke ili estas multe pli bele vestitaj ol kiam ŝi vidis ilin unuafoje antaŭ unu jaro. Ili vere havis teniĝon de studentinoj, dum ŝia filino ankoraŭ similis al la kamparaj knabinoj. Subite ŝi eksentis konsciencan riproĉon. Ŝi opiniis malklare, ke tio estas pro ŝia kulpo.

Ankaŭ Wenzhu pririgardis al sia patrino. Dum nur iom pli ol du monatoj ŝi havis pli da sulketoj survizaĝe kaj pli da blankaj haroj surkape. Ŝi ekvaltankviliĝis: inter la ses fratinoj, ŝi estas la plej aĝa. Se ŝi ne studentigis, ŝia patrino ne estus tiel penigita.

Xiao Zhou (Ŝjaŭ Ĝou), samĉambranino de Wenzhu, jam fiksrigardis ilin de longe. Rimarkinte, ke iliaj okuloj ekruĝiĝis post momenta interrigardo, ŝi ekdiris, "Via revido estas ĝojinda, do kial vi ekstristiĝis?" Aŭdinte tion, ĉiuj ekridis.

Wenzhu iom hontiĝis. Ŝi eliris pretekstante, ke ŝi volas lavi al si la manojn.

En la vespero Panjo urĝis Wenzhu al la klasĉambro por la memlernado, pretekstante, ke ŝi volas enlitiĝi iom pli frue. Xiao Zhou ĝuste deĵoris tiutage, do Wenzhu konsentis.

Apenaŭ panjo ekkuŝis, io malmola dolorigis al ŝi la kapon. Levinte la kapkusenon, ŝi ekvidis stakon da belaj notlibroj kaj du dikajn broditajn librojn. La kovriroj de la notlibroj estis faritaj el diverskoloraj satenoj. En la lakte blanka lamplumo, ili brile konfuzis oniajn rigardojn.

Xiao Zhou estis puriganta la tablojn. Ekvidinte tion, ŝi aliris kaj sciigis, "Ĉio estas premiitaj de la universitato al Wenzhu." Ŝi alprenis notlibron, turnis la unuan paĝon kaj klarigis per fingre montrante la penikajn vortojn sur ĝi. "Wenzhu kapablas elporti penigon. Ŝi povas ĉion fari. Tiu ĉi estas premiita de la universitato al la aktivuloj. Tiu ĉi estas

premiita al ŝi kiam ŝi gajnis la unuan lokon de 800-metra konkurso en la atletika konveno lastafoje, kaj tiu ĉi estas premiita al la 'tri-bonaj' modeloj." Montrante al la libroj, ŝi aldonis, "Ĉi tiuj 'Vortmaroj' estas premiitaj al la bonegaj ligoj."

La patrino de Wenzhu paliĝis de emociiĝo. Ŝi turnadis sian kapon. "Penigo estas nenio al la kamparaj knabinoj. Tio tute ne indas premion. Ŝi estis tiel mallerta hejme, kiel ŝi povis okupi la unuan lokon?"

"Jes. Ĉio ĉi estas premiitaj al ŝi mem." Xiao Zhou kapsignis jese.

La patrino de Wenzhu konis neniun vorton. Palpante tiujn ĉi valorajn premiaĵojn, ŝi verŝajne ekvidis la maldikan vizaĝon de sia filino. Nun ŝi ne plu bedaŭris.

La patrino de Wenzhu ektrankviliĝis pri sia filino en la universitato, kaj decidis, ke ŝi foriru al sia hejmo frue en la sekva mateno. Wenzhu akompanis ŝin al la pordego de la universitato. Ĵetinte kelkajn rigardojn al la filino, Panjo fine elverŝis siajn korajn vortojn: "Zhunjo, vi estas nebone vestita. Tion kaŭzas la senkapabla Panjo. Vi vestiĝos pli bone post kiam vi havos laboron." Wenzhu haste haltigis ŝin. "Panjo, kion vi diras!"

Panjo foriris, tamen ŝia figuro fariĝis pli kaj pli granda en la vidkampo de Wenzhu...

Verda Nebulo

Li Tiezhu (Li Tjeĝu)

Li volis trovi la knabinon, kiu impresis lin kvazaŭ maso da verda nebulo.

Grizhara maljunulo staris kun levita kapo ĉe la lago, kie lin trafis akcidento antaŭ semajno. Li atendis sencele. El malantaŭ liajn okulvitroj vidiĝis liaj maltrankvilaj okuloj. La dolĉa voĉo en lia memoro resonis ĉe liaj oreloj:

"Trinku iom da varma supo, Avo."

Li malfermis la okulojn. Strio da sunlumo tra la kulvualo pafiĝis al la blanka muro kaj ŝutiĝis sur la liton, sur kiu li kuŝas. Kie estas ĉi tie? Li ekflaris odoron de alkoholo- - Hospitalo! Li subite rememoris pri la obskura nokto, kiam li falis de sur sia biciklo, al la glaciĝinta lago kaj poste perdis sian konscion.

Li eksentis ion varman ĉe siaj lipoj. Kuleron da ovosupo oni portis al lia buŝo. Li ekvidis figuron sidanta sur lia litrando. Ĉu lia propra filino?-- Li remalfermis siajn okulojn-- Ne, liaj filinoj laboris en malproksimaj lokoj. Kiu estis tiu ĉi? Ĉu ŝi portis lin al la hospitalo dum lia sveno? Refoje malferminte siajn okulojn, li volis klare distingi ĉi ties vizaĝon. Sed li ne povis, ĉar liaj okulvitroj jam perdiĝis tiunokte. Li nur malklare vidis antaŭ si mason da verda nebulo.

"Dankon, knabino." Per aŭdpovo li certigis al si, ke tiu ĉi estas juna knabino. Trinkinte la ovosupon, li eksentis varmon en si. "Hej, mi maljuniĝis, kaj sekve miaj okuloj malklariĝis." Li fiksrigardis al la knabino per fendigitaj okuloj. "Kie vi laboras, knabino?"

"Kiel vi fartas nun?"

"Ho, tre bone, tre bone. Al vi mi ŝuldas mian vivon. Kiel vi... " "Ho, mi devas foriri nun. Mi revenos al vi tagmeze."

Prezinte sian librosakon, ŝi kuris el la malsanula ĉambro. Maso de verda nebulo malaperis el lia vidkampo.

La knabino vere revenis tagmeze.

Kiam ŝi metis retsakon da pomoj sur lian liton, li eksentis varmon en sia koro kaj liaj okuloj malsekiĝis-- Li rememoris siajn karajn filinojn-- Li refoje fendigis siajn okulojn por pririgardi ŝin, tamen li ankoraŭ ne povis klare vidi ŝian vizaĝon. Gutego da kristala larmo falis el lia okulkavo.

"Kio okazas, Avo? Ĉu vi estas malkomforta? Viaj okuloj... " La knabino rimarkis la ŝanĝiĝon de la maljunulo kaj demandis zorgeme.

"Miaj okuloj dependas de okulvitroj, sed tiunokte... "

"Ho... "

Li aŭdis mallaŭtan suspiron de la knabino.

Dank' al la kuracado de kuracistoj kaj prizorgado de la knabino, liaj vundoj iom post iom resaniĝis.

Iutage la knabino gaje rapidis al lia lito. "Ilin mi trovis! Ilin mi trovis!" Ŝi ŝovis ion en lian manon.

Okulvitroj! Li senprokraste surmetis la okulvitrojn per tremantaj manoj-- Ha! Ĉio klare videbliĝis: milda sunlumo, pura ĉambro, florantaj krizantemoj ĉe la fenestroj... Li subite turnis sian kapon por pririgardi la knabinon: Ŝi portis verdan vintran kostumon. Eble por knabina hontemo, ŝi mallevis sian kapon antaŭ la dankemaj rigardoj de la maljunulo. Densaj haroj falis kaj kovris ŝian vizaĝon. La harpintoj sin premis al ŝia ondetanta brusto. La blanka lerneja emblemo kun ruĝaj vortoj glimbrilis.

La knabino eksvingis sian densan haron kaj elvidiĝis ŝiaj ruĝetaj vangoj. Ŝi ekflugis el la malsanula ĉambro lasinte nur "Ĝis revido!"

Stumble paŝinte al la fenestro, la maljunulo ekvidis la verdan knabinon kun librosako rapide iranta sur pavimo sub la etaĝdomo. Li rigardis senpense ĝis ŝi malaperis inter la pasantoj, el la profundo de lia vidkampo... Tamen en lia memoro refoje leviĝis maso da verda nebulo.

Li ektrovis la knabinojn en verda vintra kostumo, unu, du, tri...

Efiko de la Vino

Xu Xiaoming (Ŝjŭ Ŝjaŭmin)

Oni diris, ke li estas honesta kaj malkuraĝa. En la fabriko li neniam kverelis kun la aliaj, kaj en la hejmo li ĉiam obeis sian edzinon. Kutime li nek fumis nek drinkis.

Iutage lia edzino faris senprecedentaĵon: Ĉe la manĝo ŝi subite metis botelon da blanka vino sur la tablon, dirante, "Hodiaŭ vi devas drinki." Li rigidiĝis.

"Pro kio vi rigidiĝis?" La edzino diris laŭte, "Kiu en nia fabriko estas tia, kia vi? Pripensu, kiu kun la longa labordaŭro kaj malgranda nesto kiel vi ne ricevis novan domon? Ili ja scipovas paroli, scipovas kvereli, scipovas subaĉeti. Sed vi? Kapablas je nenio! Ankaŭ vi havas buŝon, do kial vi ne scipovas paroli? Oni diras, ke trinkado de vino povas kuraĝigi. Trinkinte vinon vi povas diri ĉiajn vortojn. Hodiaŭ vi trinku kelkajn tasojn. Kuraĝigu vin. Ne zorgu pri via honoro. Iru al la fabrikestro kaj al la sekretario. Ne plu revenu hejmen se ili ne konsentos doni al vi novan domon je ĉifoja domdistribuado. Dormu en la hejmo de la fabrikestro, aŭ de la sekretario!"

Tiel, instigite de sia edzino, li trinkis iom da vino kaj vere iris al la fabrikestro.

"Mi havas ion... ion por peti... peti de vi, Fabrikestro." Antaŭ la fabrikestro, lia vizaĝo ruĝiĝis, oni ne sciis, ĉu pro sia drinkado aŭ sia sinĝenemo.

"Diru." La fabrikestro montris nenian emon rifuzi tiun ĉi honestulon, kiu unuafoje venis por peti helpon.

"Mi venas, venas... estas mia edzino, kiu alvenigis min. Vi scias, ke mi... mi estas zorgema pri... pri honoro, tial

mia... mia edzino speciale... speciale drinkigis... drinkigis min. Mia edzino diris... "

"Kian aferon?"

"Mia edzino diris, ke drinkado povas kuraĝigi. Trinkinte... trinkinte vinon, oni povas diri ĉiajn vortojn, tial ... tial ŝi ordonis min drinki por... por veni al vi... "

"Diru rekte!" La fabrikestro iom malpacientiĝis.

"Jes... tiel... Mia edzino, ŝi ... ŝi diris, ke kun tiel longa labordaŭro kaj tiel malgranda nesto kiel mi, kiu... kiu en nia fabriko ne ricevis novan domon. Mia edzino diris ke ... se la fabrikestro kaj sekretario ne konsentas en dsitribuo al mi novan domon, ŝi ordonis... ordonis, ke mi dormu en la hejmo de la fabrikestro aŭ sekretario... Mia edzino ankaŭ diris, ke la aliaj scipovas paroli, scipovas kvereli, kaj scipovas subaĉeti, sed mi... "

"Kion vi diris!" La fabrikestro montris sian malplezuron.

"Tio estas pro mia edzino, ŝi speciale... speciale drinkigis min, kaj diris... "

"Lasu. Mi jam komprenas. Sed mi ne rajtas decidi sola. Dum diskutado mi elmetu vian peton."

"Tenu vian vorton, Fabrikestro... "

Tiel alvenis la sekva tago. Vekiĝinte matene, li sobriĝis de la antaŭa ebrieco. Li subite demandis al sia edzino, "Ĉu tio estas trafa?"

"Kio maltrafa!" La edzino respondis kolerete.

Li ne sciis kial, ke li subite ektimis renkonti la samfabrikanojn sur la vojo al la fabriko, kvazaŭ, ke li estus ŝtelisto. Preterpasonte la pordon de la fabrikestra oficejo, li intence ĉirkaŭpasis ĝin de malproksime kvazaŭ timante renkonti iun.

"Ĉu tio estas trafa?" Tiutage, li fojfoje pripensadis tion. "Kion mi diris al la fabrikestro hieraŭ? Kiel mi povus tiel konduti? Vere hontinde. Kiel rigardos min la fabrikestro? Kiel rigardos min la samfabrikanoj se ili informiĝos pri tio?... Mi ja devas iri al la fabrikestro por klarigi, ke hieraŭ... " Tiel pensante, li kelkfoje ekvolis iri al la fabrikestro por klarigi, sed sin kuraĝiginte kelkfoje, li senkuraĝiĝis ĉiufoje.

En tia pensstato li restis ĝis la fino de la deĵortempo. Li refoje sin kuraĝigis kaj atendis la fabrikestron sur la vojo, kiun la fabrikestro senescepte iras por reveni al sia hejmo. Tamen ekvidinte lin de malproksime, li havis nenian kuraĝon por saluti lin.

"Mi ne devas tiel konduti. Mi devas klarigi!" Reveninte hejmen, li ankoraŭ tiel pensis, tamen neniel kapablis ekmovi siajn krurojn. Subite la rigardo trafis la botelon de la restigita vino sur la tablo. Instigite de tio, li kaptis la botelon, faris unue profundan enspiron kaj poste enbuŝigis la buŝon de la vinbotelo... "

"Por hieraŭa afero, Fabrikestro, mi denove venas... " Li refoje revenis al la pordo de la fabrikestro kun ruĝa vizaĝo.

"Vi?... "

"Jes, Estro. Hodiaŭ, hodiaŭ mi meminciatite drinkis... "

La fabrikestro elmontris rideton sur sian vizaĝon, "Ne estu tiel malpacienca. Morgaŭ oni anoncos pri la distribuado. En la nomlisto ja troviĝas via nomo."

"Ja. tiel, Fabrikestro--- Ne..." Li subite eksentis, ke li jam sobriĝis de la ebrieco.

Kion Mi Pentru?

Qiu Fuquan (Ĉju Fuĉjŭan)

Sur la herbejo de la parko sidis kvin unujarklasaj geknaboj, tri knaboj kaj du knabinoj, baniĝante en la varma kaj brila lumo de la vintrokomenca suno.

Ili ĵus kune legis tre interesan bildlibron "La Magia Peniko de Maliang (Maljan)". Ĝi priskribis, ke knabo Maliang, havis magian penikon, per kiu kion li pentris, tio realiĝis. La pentrita koko povis kokeriki kaj la pentrita plugilo povis plugi teron... Tiel revige!

"Kiel bone se mi havus tian magian penikon!" Diris Xiao Man (Ŝjaŭ Man), knabo kun bukla haro.

"Tio ne eblas," diris Zhou Ming (Ĝoŭ Min), kun miopaj okulvitroj, mienante kiel plenkreskulo. Lia patro estis redaktoro de la provinca eldonejo. "Tio estas nur fabelo."

"Ni nur supozas." diris Yuangyuan (Jŭanjŭan) kun alteta nazo.

"Jes. Ni supozu, kion ni pentru se ni havus la magian penikon." Palpebrumante siajn grandajn okulojn, diris knabeca Zhang Xiaoli (Ĝan Ŝjaŭli) kun ĵus tranĉita mallonga haro.

"Nur unu fojon." sugestis tre serioze Wang Bing (Ŭan Bin), pozante, ke li tenas la penikon en la mano.

Post momenta meditado, ĉiuj ekparolis preskaŭ samtempe.

"Mi pentrus novan skribotablon. Lastfoje kiam mi iris por transdoni kajerojn, mi vidis, ke la tablo de Instrusito Wu (U) havas grandan fendon en la centro." diris Xiao Man.

"Aŭskultu min! Mi pentrus piedbalejon por nia malgranda teamo, kiel tiun por la Mondpokala Konkurso." Yuangyuan ekparolis antaŭ ol finaŭskulti la vortojn de Xiao Man.

"Mi pentrus tendon," diris Zhou Ming malrapide, "por ŝirmi la onklojn policistojn de vento kaj pluvo."

"Mi pentrus por mia panjo nenion ol aŭtomatan lavmaŝinon, kiu povas lavi, tordi kaj sekigi. Ŝi estas tro peniga." Wang Bing diris kvazaŭ pafi per maŝinpafilo.

Jen la vico por Zhang Xiaoli.

"Mi..." Ŝi balbutis.

"Eldiru!" ĉiuj urĝis ŝin hasteme.

"Mi pentrus multajn kaj multajn parojn da okuloj." daŭrigis Zhang Xiaoli, kun amzorga mieno, "por donaci al la kolegoj de miaj paĉjo kaj panjo."

Kvietiĝis la geknaboj. Ĉiuj pensis, ke ili lasos Xiaoli pentri la unua se ili vere havus la magian penikon kaj rajtus pentri nur unufoje. Ĉiuj sciis bone, ke ŝiaj patro kaj patrino laboras en la fabriko ĉe la strantangulo...

Tie estis la urbofunkciata fabriko por blinduloj.

Fremda Titolo

Liu Binbin

Antaŭ tagmeze, kiam Direktoro Wu (U) de la Buroa Partikomitato absorbiĝis en legado de la dokumentoj dissentotaj al la subuloj en la oficejo, iu kun okulvitroj malpeze malfermis la pordon kaj enŝovis la kapon.

"Ĉu kamarado Wu Ming (U Min) estas ĉi tie?" Li demandis ĝentile.

"Ne." Direktoro Wu respondis sen levi la kapon.

"Ĉu vi bonvolas diri al mi, kien li iris?" Li demandis denove.

Direktoro Wu iom malpaĉienciĝis, "Mi ne scias."

"Pardonon." Li kapsalutis pardonpete kaj retiriĝis.

Direktoro Wu stariĝis kaj fermis la pordon. Sed apenaŭ li ekvidis sur la kanseĝon, oni ekfrapis je la pordo.

"Kiu?" Direktoro Wu iom koleriĝis de la frapado.

"Mi, Direktoro Wu." De la voĉtono direktoro Wu eksciis, ke tiu estas Sekretario Wang (Ŭan) de la oficejo. Tial li aliris kaj malfermis la pordon.

"Kion fari?" Rigardante al la sekretario iom malgaje, Direktoro Wu demandis.

"Iu volas viziti vin, direktoro Wu." Diris la sekretario, subkonscie flankeniĝante.

Levinte la kapon, Direktoro Wu iom konsterniĝis. La alveninto estis neniu alia ol tiu kun okulvitroj!

"Direktoro Wu, Ĉu vi estas Kamarado Wu Ming?" La alveninto demandis ankoraŭ ĝentile.

Kamarado Wu Ming, kiu kutimas, ke oni titolas lin Direktoro Wu, ekkonsciis, ke Wu Ming estas nenio alia ol lia propra nomo. Ruĝiginte, li povis respondi nenion alian ol "Jes, jes, mi nomiĝas Wu Ming."

Knabino aĉetadanta rostitaĵon

Wang Qing (U Ĉin)

Strange, kial tiu ĉi frandema knabino ne plu aĉetas rostitaĵon en la lastaj tagoj? Sidante en angulo, mi manĝis kaj rigardis ŝin enviciĝi por aĉeti terpomaĵon.

Antaŭ duonmonato mi vidis ŝin unuafoje ĉe la giĉeto por rostitaĵo. Tagmeze de tiu tago mi iris aĉeti rostitaĵon kaj renkontis ŝin tie. Ni ambaŭ samtempe ŝovis niajn manĝskatolojn tra la giĉeto, sed tie restis nur lasta porcio de la rostitaĵo. Vidante tion, ŝi hasteme kriis, "Al mi, al mi!" Pro tio, la vendisto donis la krommanĝaĵon al ŝi. Rigardante, ke ŝi forkuras saltetante kun la bonodora manĝaĵo en la mano, mi pretervole grumblis, "Frandemulino!"

Dum pli ol dek tagoj ĉiufoje kiam mi aĉetis rostitaĵon, ŝi ĉiam ankaŭ aĉetis la saman. Mia antaŭjuĝo pli kaj pli profundigis. "Ŝi estas vere frandema."

"Hm! en la antaŭa duonmonato vi nur manĝadis rostitaĵon, sed nun pro 'ekonomia krizo' vi ekmanĝas terpomaĵon. Vi vere estas ne perspektivhava." Mi transigis mian rigardon al la plafono kaj ekpensis iom malice.

Mi ne havos lecionon posttagmeze, do mi, amatora ĵurnalisto, akceptis taskon: Intervjui knabinon nomatan Guan Xian (Guan Ŝjan). Iu letero por ŝin laŭdi tiel legiĝis: "Mi alvenis el kamparo, estas la malplej aĝa en la klaso. Antaŭ duonmonato mi enhospitaliĝis en la lernejo pro malsano. Guan Xian, la tri-bona studentino en nia klaso, min prizorgis, konsolis kaj lernigis kiel pliaĝa fratino. Kaj krom tio, ŝi klopodis plibonigi mian manĝaĵon por doni al mi pli da nutraĵo..."

Kun granda estimo mi iris al la loĝdomo de Guan Xian. Permesite, mi enĉambriĝis. "Pardonu, kiu nomiĝas Guan Xian?" "Mi," iu studentino demetis sian libron kaj stariĝis.

Ha! Ĉu ŝi ne estas la knabino, kiu aĉetadis rostitaĵon? Mi surprizite rigidiĝis. Subite mi ekkonsciis, ke mi miskomprenis ŝin. . .

Teniĝo

Li Yongjian (Li jonĝjan)

Malsaniĝis la bopatro. Kuŝante surlite, li estis mortanta.

La bofilino Suiying (Sŭijin) sin okupadis por la eventuala funebro. La najbarinoj ankaŭ venis por helpi en kudrado de mortula kostumo, farado de la funebra rubando, kaj aliaj. Jam alvenis la lastaj tagoj de la maljunulo, kiu ŝajne ne povas facile trapasi sian tutan vivon. Domaĝis nur tio, ke lia filo ne estas ĉe li dum lia forpaso. La bonkoraj vilaĝanoj maltrankviliĝis pri tio kaj ĵetis sian riproĉan rigardon al la bofilino de la maljunulo.

Malkaŝema Onklino Yulian (Julian) kondukis Suiying en la ĉefan ĉambron tirante je ŝia mano kaj diris mallaŭte: "Suiying, ŝajne la maljunulo ne povos plu vivi tagojn pli longe. Sendu telegramon al Weihua (Ŭejhŭa), ke li revenu hejmen. "

Suiying ekstremitis, kaj la larmogutoj ekruliĝis en ŝiaj okulvovoj. Kolektinte sian forton, ŝi diris singultante, "Weihua... skribis, ke lia armeo havas ian taskon por plenumi, kaj ni ne devas ĝeni lin."

"Kio?" Onklino Yulian rondigis siajn okulojn. "Rigardu, kia tempo estas nun! Vi ankoraŭ skrupulas pri la ĝenado. Ĉu vi ne scias, ke antaŭ duonjaro, post kiam via bopatrino forpasis, ŝi lasis la okulojn ne fermitaj dum tri tagoj? Ŝi ja sopiris al sia kara filo. Vi estas tro senkompatema. Nun la ununura maljunulo forpasas, ĉu vi ne rajtas revenigi Weihua?"

"Onklino Yulian, mi... " Kun larmoplenaj okuloj, Suiying volis ion diri, tamen ŝi englutis la restajn vortojn.

La bopatro senforte ektusis, do Suiying hastis en la ĉambron.

La najbarinoj en la ĉefa ĉambro ege malkontentiĝis. Ili ekkomentis indignoplene, "La bofilinoj sendube estas eksteruloj. Ili tute ne povas esti kompareblaj kun la karuloj." "Vere strange, tiel fidela kaj obeema ŝi ja estas en la ordinaraj tagoj, sed pro kio ŝi neniel volas revenigi Weihua?" "La maljunulo pene laboradis dum sia tuta vivo kaj li ne povas lasi sin forpasi sen apudesto de la filo. Se ŝi ne venigos lin, ni tiel agu." Incitite, Onklino Yulian kolere elĉambrigis Suiying, "Suiying, donu al mi la leteron de Weihua. Malgraŭ ĉio li ja devus reveni hejmen por lastafoje revidi sian patron. La maljunulo havas nur tiun ĉi filon kaj Weihua nur tiun ĉi maljunulon. Se vi ne volas tion fari, mi mem telegrafu lin." La najbaroj ankaŭ eĥis, "Suiying, revenigu Weihua."

Suiying ne povis sin deteni de tremego. Perforte retenante sian larmon, ŝi ĵetis rigardon al la najbarinoj, faris longan suspiron kaj poste malrapide movetis sian korpon en la ĉambron. Ŝi malfermis la ŝrankon kaj elprenis pakaĵon. Portante la pakaĵon en siaj manoj, ŝi eliris stumble al Onklino Yulian kaj ne pli povis deteni sin de genuiĝo kun la kapo frapiĝinta kontraŭ la pakaĵo. La larmoj eltorentis kaj ŝi eksplodis de dolora plorego. Vidinte, ke ŝi ploras tiel dolore, la najbarinoj konsterniĝis kaj haste subtene starigis ŝin. Suiying vortis plorĝemante, "Onklino Yulian... Weihua... jam... martiriĝis, en la batalejo. Lastjare... iu el lia armeo... venis al mia laborunujo. La maljunuloj estis en malsano... do mi ne volis lasi ilin scii. Jen... jen liaj medaloj kaj ankaŭ postlasaĵoj... "

A Liao

Yang Jin (Jan Ĝin)

La edzono de A Liao naskis filon. Ekzaltiĝinte, A Liao aĉetis kvin kilogramojn da buterbombonoj kaj donacis al ĉiu familio sur aŭ sub la etaĝo.

En la tuta etaĝdomo loĝis sep aŭ ok familioj. Sed ses paroj da geedzoj el ili naskis filinon. Ĉiuj ja enviis A Liao pro lia novnaskita filo. A Qiang (A Ĉjan), kiu loĝas sur la dua etaĝo, estis solfilo, tamen eĉ lia edzino naskis filinon. A Qiang ofte ĵetis malplaĉajn vortojn al la edzino, ke li estis eĉ malpli supera ol A Liao. Pro tio, la edzino ofte kverelis kun A Qiang. Tion aŭdinte, A Liao hastis al ili por interpacigi.

"Lasu! Lasu do. Ĉu naski bebon aŭ bebino ja decidus vi ambaŭ flankoj. Eĉ mi dezirus bebinon." Kun la ride disfloriĝanta vizaĝo, A Liao admonis al A Qiang.

"Do kion vi opinias, se mi interŝanĝu vian filon per mia filino?" A Qiang koleriĝis.

"Mi ja konsentus... tamen ĉu ni rajtus tion fari?" A Liao ridklukis, kaj lia koro dolĉiĝis kvazaŭ trempiĝinta en mielo.

A Liao admonadis longan tempon. Post kiam la geedzoj A Qiang ĉesis kvereladon, li iris malsupren. Reveninte hejmen, li fiksis sian rigardon al la dormanta knabeto, kaj sentis sin baniĝanta en granda feliĉo.

Tuj kiam someriĝis, ĉiuj loĝantoj de la etaĝdomo supreniris al la tegmenta teraso por ĝui malvarmeton. Nature, A Liao ankaŭ iris sur la terason kun sia fileto. Tenante la tute nudan bebon alte super sia kapo kaj permane ludetante lian "birdeton", A Liao intence paŝadis tien kaj reen antaŭ la geedzoj, kiuj havas filinon. Vidante la enviajn kaj samtempe

admirajn rigardojn de ili, li vere ebrigiĝis de ĝojo kaj eksentis, ke li superas ĉiujn aliajn.

Kun la fileto en siaj brakoj, A Liao paŝis al la geedzoj A Shan (A Ŝan). La edzino dormetis sur mato kun elstara ventro dum la edzo por ŝi forpelis moskitojn per granda tifaa ventumilo.

A Liao sidiĝis ĉe A Shan. "Ĉu vi deziras fileton?"

"Jes." A Shan konfesis honeste.

"Kion vi farus se ŝi naskos filon?"

"Tio ne eblos. Ŝi certe naskos filon. A Shan respondis memfidplene.

A Liao eksentis sufokon, kvazaŭ io premus en lian koron. "Kian manĝaĵon ŝatas via edzino, ĉu acidan aŭ akran?"

"Akran, tamen..." A Shan respondis.

"Acidan por filo kaj akran por filino. Via edzino certe naskos filon. Jes. Destinata al vi. Hahaha..." Ekĝojis A Liao kaj li foriris kontente kun la fileto en la sino....

Post nelonge, la edzino de A Shan naskis filon, simile al tiu de A Liao. La novnaskito estis diketa, blanka, kaj vere aminda. En la monatiĝa celebrado de sia fileto, A Shan invitis ankaŭ A Liao al festeno, sed tiu ĉi ne iris pretekstante, ke li malsaniĝis.

"Fi al lia patrino! mi havas filon, kial ankaŭ li havas!" A Liao ekkoleriĝis.

En la varma vetero, la edzino petis A Liao porti la fileton al la tegmenta teraso por ĝui la malvarmeton. A Liao rifuzis, sed la dorlotata fileto insistis obstine kun ploro. A Liao furioziĝis de tio kaj manfrapis je la fileto. Do la knabeto senĉese ploregis. Por elverŝi sian koleron, A Liao

ekĵetadis objektojn en la ĉambro. Timigite de tio, la edzino forisis sola brakumante la fileton.

A Liao ne plu suriris al la teraso kaj kuŝis surlite la tutan nokton sendorme pro malbonhumoreco.

Neniu atendis, ke A Shan ne povis reteni ĉe si la feliĉon. Lia fileto mortis pro akuta malsano. Tiufoje, seninvitite, A Liao iris kun saketo da pomoj, ladmanĝaĵoj kaj aliaj por konsoli la geedzojn A Shan. Ĉiuj najbaroj laŭdis, ke A Liao estas bonkora. A Liao denove estis tia, kia li estis antaŭe, ke tuj post noktiĝo, li brakumis la fileton al la tegmenta teraso, kaj babilante, ĝuis malvarmeton kune kun aliaj...

Strangaĵo pri la Strangulo

Song Yingjie (Son Jingjie)

Wang Quan (Ŭang Ĉŭan) gajnis la unuan premion en poema konkurso de poema gazeto "Eksplozo". La raportisto de tiu ĉi periodaĵo decidis verki rapordon por li.

Atinginte la domon de Wang Quan, la raportisto ekfrapis je la pordo. Juna virino kun deprimita mieno eliris kaj enkondukis lin.

La virino diris, "Mi estas la edzino de Wang Quan. Kion vi volas?"

La raportisto demandis, "Pardonu, ĉu Wang Quan estas hejme?"

La edzino de Wang Quan kapjesis.

"Ĉu mi rajtas peti lin eliri? Mi estas raportisto de poema gazeto "Eksplozo", kaj volas interparoli kun li pri la premiita versaĵo. "

"Pardonu, li ne povas eliri por vidi vin."

"Pro kio? "

"Li estas malsana."

Aŭdinte tion, la raportisto ekĝojis en si. Venis al li ideo: Li ne povas eliri por vidi min? Ĉu li suferas de paralizo je malsuperaj membroj? Tio ja estas plej bona priskribaĵo. Ĉu tio ne estas bona materialo pri handikapulo kun firma volo? Li haste diris, "Ne gravas. Se li ne povas sin movi facile, mi iru por vidi lin. "

La edzino de Wang Quan subite turnis sian paroltemon, "Bonvolu diri al mi, el kiaj homoj konsistas la premiojuĝa komitato por tiu ĉi konkurso? "

Havante nenian ideon, kial ŝi elmetis tian demandon, la raportisto respondis, "El la plej eminentaj poetoj kaj komentaristoj en la tuta lando."

La virino ekridis amare, dirante, "Ĉu vi scias, de kia malsano suferas Wang Quan? -- de skizofrenio!"

"Ha?!!" La raportisto surpriziĝis.

La edzino de Wang Quan daŭrigis, "Wang Quan amegis versaĵon antaŭe. Li sendadis siajn kontribuaĵojn multfoje, tamen ĉiufoje li ricevis nenian respondon, kvazaŭ li ĵetus ŝtonon en la maron. Pro tio li mense iritiĝis kaj ekmalalaniĝis antaŭ unu jaro. La versaĵo tute ne povas kalkuliĝi kiel versaĵo pro la senorda logikeco, kvazaŭ parolo en la dormo. Lia sanstato ankoraŭ ne pliboniĝis."

Granda surprizo trafis la raportiston.

Neatendite, malfermiĝis la pordo de la interna ĉambro kaj eliris viro kun idioteca mieno. Li stultece ridis al la edzino de Wang Quan kaj poste gapis al la raportisto.

La edzino de Wang Quan alpaŝis kaj ameme prenis lian manon en la sian, "Quanĉjo, revenu en la ĉambron."

Wang Quan skuis la kapon senpripense. "Ho, mia ĉielo! Kiel la versaĵo skribita de idioto povus esti premiita?" Konfuziĝis la raportisto.

Subite Wang Quan demandis per fingre montrante al la raportisto, "Ĉu vi estas kuracisto?" La raportisto portis blankan jakon.

La raportisto skuis la kapon, respondante, "Ne, mi estas raportisto."

Subita ekbrilo flagris en la okuloj de Wang Quan, "Raportisto? De kie?"

"De la poema gazeto 'Eskplodo'."

Wang Quan malfermegis siajn okulojn kaj diris enpripensiĝinte, " 'Eskplodo'? Kial vi venas? Vi ja ne estas kuracisto!"

"Via versaĵo estis premiita kaj mi venis por fari intervjuon".

"Premiita?" Murmuris Wang Quan. Li eksteratendite ekkriis kvazaŭ ĵus vekiĝinta el la sonĝo: "Ho, mia versaĵo estis premiita! Ha! Premiita!" Kriante, li subite falis malantaŭen kaj eksvenis.

La edzino haste subtenis lin. La raportisto helpis ŝin porti lin en la sofon, kaj haste elkuris telefoni por la ambulanco. La edzino blasfemis en si, "Ĉiuj anoj de la komitataĉo por premiojuĝo estis vere blindaj, kaj ili donis tiel grandan inciton al Wang Quan. Kion mi faru se lia malsano pli graviĝus!"

Momenton poste Wang Quan sobriĝis. Li sidiĝis kaj demandis al sia edzino, "Kial mi kuŝis tie ĉi? "

"Vi svenis antaŭ nelonge."

"Svenis?" Wang Quan diris al si mem. Ŝajne, li subite rememoris pri io, haste kaptis la manojn de la edzino kaj demandis, "Ĉu ne mia versaĵo estis premiita?"

La edzino kapjesis.

Wang Quan denove demandis: "Vere? Ĉu vi ne trompas min?"

Doloris la manoj al lia edzino pro lia manpremo. "Kiu trompu vin? "Ŝia koro eksaltegis, "Je la mieno kaj vortoj, li ja similas al normala homo. Ĉu la incito resanigis lin?" Ŝi sin returnis kaj alportis la ateston por la premio, kiun ŝi ricevis antaŭ kelkaj tagoj kaj neniel kuraĝis montri al li.

Wang Quan tenis la ateston kun orumitaj ideogramoj en la manoj kaj liaj larmoj ekfluadis. Li ne povis deteni sin de ĉikaŭpreno al la edzino, "Mi sukcesis! Finfine mi sukcesis!"

La koro de la edzino disfloriĝis de ĝojo. Ŝi emociiĝis ĝis larmoverŝo. Jen resaniĝis la kara edzo!

Telefoninte, la raportisto revenis al la pordo, kaj li rigidiĝis antaŭ tiu ĉi bildo.

Aŭdinte, ke iu envenas, Wang Quan haste delasis sian edzinon. Ambaŭ geedzoj honteme forviŝis sian larmon kaj invitis la raportiston en la ĉambron.

La edzino gaje esprimis sian dankemon al la raportisto: Ĝuste ilia premio donis la duan vivon al la edzo. La raportisto embarasiĝis de tio, kaj li pensis ŝtele, ke tiu ĉi intervjuo jam vaniĝis fuŝite. La edzino de Wang Quan invitis lin al manĝo, tamen li fordankis kaj foriris kun granda demandosigno en la cerbo.

Do post tio, Wang Quan publikigis siajn versaĵojn en multaj periodaĵoj en la tuta lando, kaj estis titolita kiel fama poeto. Oni diras, ke li poste fariĝis la iniciatinto de iu versa skolo.

Bofratino Kokino

Qiu Fuquan (Ĉiŭ Fuĉŭan)

Ĵus kiam Erwa (Erŭa) kun dorskorbo surdorse eliris por viziti foiron, lia najbarino Bofratino Kokino ridetante iris en lian korteton kun fasko da bambuaj strioj en la brakoj.

Ekvidinte Bofratinon Kokinon, Erwa iom konsterniĝis. Li haste sin turnis en la ĉambron, demetis la korbon kovritan de pajloĉapelo, senprokraste eliris kaj firme ŝloŝis la pordon. Poste, li eksalutis ŝin balbute: "Bonvolu sidiĝi."

Bofratino kokino ekridetis. Ŝi demetis la striojn kaj ĵetis sian rigardon al la ununura sidloko-- la kapkuseno-simila ŝtono sur la pordŝtupo, sed ne sidiĝis. Ŝi nur diris senĉirkaŭfrazo al Erwa, ke ŝi venas por plekti kokinan kaĝon por li.

Oni nomis Bofratinon kokinon antaŭ per Bofratino Orangô. Pasintjare ŝi gvidis la vilaĝanojn planti oranĝarbojn por disvolvi la varan produktadon. Sed oni ne povis sin desoifigi per akvo tro malproksima. La plantitaj oranĝarboj donos profiton nur post tri jaroj. Do ŝi denove fariĝis kokinbredistino, kiu povis sin ekprofitigi en nur unu jaro, kaj samtempe helpis aliajn ankaŭ bredi kokinojn. Pasintjare Erwa aĉetis kokinojn per pruntita mono, sed pro liaj mankoj de breda tekniko kaj kokinkaĝoj, la endomaj kokinoj fariĝis sovaĝaj, kaj ne plu revenis kurinte eksteren. De tiam, tiu fraŭlo preskaŭ tridek-jara faris nenium alian kromokupon kaj sin vivtenis tre malfacile.

"Erwa, ĉu vi denove vizitos la foiron por vendi milion?" Bofratino Kokino bone sciis, ke okdekpocente li iros al la foiro kun dorskorbo, kaj ke li certe vizitos restoracion en la foiro, en la restoracio li certe elspezos monon kaj por la mono li devos forvendi sian grenon.

"Hum...ne, ne." Erwa balbutis hezite, ĉar en sia koro li kaŝis ion.

"Hihi, kio okazis al vi? Ĉu vi trinkis balbutigan akvon?" Malkaŝema Bofratino Kokino trovis sur la pordŝtupo taŭgan lokon por plekti kaĝon kaj ekordonis al Erwa, "Venu! Mi pleku kaj vi faru helpon. Alprenu hakilon!"

Hakilo? La hakilo ja estas en la ĉambro! Erwa ekpensis, ke li nepre ne malfermu la pordon. Alie, bofratino Kokino enĉambriĝus kaj tio kaŭzigos grandan fatalaĵon. La sprita Erwa mensogis: "Hakilo? Mi perdis."

Bofratino kokino denove ridklukis kaj iris el la korteto por alpreni la hakilon kaj aliajn ilojn el sia propra domo.

Erwa sekvis ŝin ekster la pordon. Vidinte, ke ŝi vere iras al sia korto, li haste sin turnis al la ĉambro, puŝis la dorskorbon kovritan de pajloĉapelo en la malhelan angulon sub la lito, elprenis malnovan radioricevilon, kiun oni ne scias de kie li prenis, eliris, ŝloŝis la pordon, ŝaltis la aparaton je plena sonvolumeno kaj metis ĝin sur la sojlon. La radio eliganta kantojn kvazaŭ pordogeneralo anoncus per sia raŭka voĉo: "Neniu alia rajtas eniri."

Post tio, Erwa iom trankviliĝis, tamen ankoraŭ dubis, ĉu Bofratino Kokino vere venas plekti kaĝon por li.

Jes, vere. Ridetante, Bofratino Kokino denove paŝis en la korteton de Erwa kun hakilo kaj fera drato en la maldekstra mano kaj kokina trogo en la alia.

"Hihihi...Ĉu vi sentas solecon?" Aŭdinte, ke la radioaparato disaŭdigas dancmuzikon por Disko, Bofratino Kokino ekŝercis, "Post kiam vi vin riĉigos per bredado de kokinoj kaj plantado de oranĝarboj, vi prenu ĉarman edzinon. Tiam vi ne plu sentos solecon. Mi estu la svastino por vi."

"Hum...Ne."

Bofratino Kokino lertis je plektado de kaĝoj. Ŝi sin okupis en la plektado dum Erwa transdonis ilojn laŭ ŝia ordono. Oni ne scias, ĉu pro io kaŝita en lia koro aŭ pro lia distriteco, kiam ŝi postulis ĉi tion, Erwa transdonis alian.

"Kio okazis al vi? Ĉu vi denove eksopiris al la ĉarma edzino?" Bofratino Kokino postulis feran draton dum Erwa transdonis al ŝi hakilon.

"Hum...ne." Malgraŭ la ŝercado de Bofratino Kokino, Erwa neniel povis incitiĝi. Li senĉese pensis en si, "Mi dankas vin se vi tenus vin ekster mia ĉambro."

Ho, terure! Bofratino Kokino vere demetis la plektaĵon kaj iris al la pordo de la ĉambro-- Haj, dankon al Ĉielo! Ŝi ne provis malfermi la pordon, sed nur malplilaŭtigis la sonon de la radio. Ŝi volis instrui Erwa pri bredda tekniko profite de la tempo kiam ŝi plektas la kaĝon.

"Mi volas, ke mi kaj aŭskultu vin, kaj aŭskultu..." Erwa haste replilaŭtigis la sonon je plena volumeno.

Bofratino Kokino ne plu zorgis pri tio. Plektante, ŝi laŭte ekparolis pri la tekniko de bredado: Kia kokino estas plej bona. Kiel oni kuracu infektan malsanon por kokinoj, k.a.

Poste, Bofratino Kokino diris al Erwa, ke krom bredi kokinojn plej bone bredu ankaŭ anseron (Laŭ ŝia propra sperto), por ke la ansero estu gardisto por kokinoj. Se alvenas putoro, la ansero ekgrakas kaj per tio fortimigos la kokinŝteliston...

"Hihi...ansero ankoraŭ povas anonci la alvenon de senvosta ŝtelisto." Bofratino diris senatente, "Hieraŭ nokte, aŭdinte la grakon de ansero, mi opiniis, ke alvenis putoro kaj ne eliris. Sed kiam mi bredis kokinojn ĉimatene, mi trovis, ke mankas mia flava kokino. Se tiam mi ellitiĝus-- feran draton. Donu al mi feran draton!"

"..."stupora Erwa transdonis hakilon!

Post nelonge, la tute nova kaĝo aperis sub la pordŝtupo de Erwa. La finfine elstuporiĝinta Erwa volis esperimi sian dankemon al Bofratino Kokino, tamen pro balbutio li povis diri nenion. Kolektinte sian ilaron, Bofratino kokino elprenis novan monbileton por dek juanoj kaj enmanigis ĝin al Erwa, ke li iru al la bredejo por aĉeti kokidojn.

Fiksrigardante la novan kaĝon kaj ankaŭ la varman monbileton, Erwa emociiĝis. Li eksentis sian koron varma kaj la nazon acideta. Du kristalaj larmogutoj sin rulis en liaj okulkavoj.

Li ne rimarkis, kiam foriris Bofratino Kokino.

Noktiĝis. Erwa elkortiĝis. Rigardante, ke neniu troviĝas ĉirkaŭe, li revenis en sian ĉambron, rampis sub la liton kaj elprenis la misteran objekton el la dorskorbo. En protekto de la obskura mallumo, li glitis en la korton de bofratino Kokino kaj ŝtele remetis ĝin en kokinkaĝon...

Ĉarlatandrogo

Xu Dongping (Ŝjü Donpin)

"Estimataj gesinjoroj, oni dependas de siaj gepatroj hejme kaj de siaj amikoj ekstere. Hodiaŭ mi, via humila malpliaga frato, havas honoron alveni al via trezora loko de malproksime. Jen mi ludas ion por vi. Se tio plaĉas al vi, geonkloj kaj gefratoj, bonvolu aplaŭdi per viaj honoraj manoj kaj hurai per via ora gorĝo por mi, via humila frateto."

(Li prenis ŝtonpecon de sur la tero.)

"Rigardu, gesinjoroj. Tio ja estas vera ŝtono, ŝtono el Kunlun-montaro. Rigardu, ĉu tio estas vera?"

(Knabino kapjesis.)

"Ĉu tio estas vera?"

(Knabo ektuŝis ĝin kaj kapjesis kun rideto.)

"Nu, mi duigos ĝin permane."

(Junulo laŭte diris ion.)

"Kio? Mi ne kapablas? Se mi ne kapablas, mi do estu damnita. Haj—haaaj!(La tono pli kaj pli altiĝis.) Bone. Gesinjoroj, aplaŭdu."

(Malmulte da ĉirkaŭrigardatoj malforte klakis siajn manojn.)

"Dankon, dankon. Eble iu el vi demandus, ĉu mi postulos monon por tio. Ne. Ne maltrankviliĝu. Se mi postulos monon, mi do estu bastardo sen patro. Nu, ĉu mi diris malprave? Iu volas foriri."

(La forironta knabino ekhontis kaj revenis.)

"Gesinjoroj! Ne estu maltrankvila. Mi, via humuila frato, venas de loko malproksima je mil kilometroj por ĝui la famajn montojn kaj riverojn, kaj por renkontiĝi kun vi honoraj amikoj. Mi venas nur por propagandi nian produkton. Se mi ludas bone, hurau por mi. Se mi ludas malbone, forpelu min. Estimataj gesinjoroj, bonvolu rigardi!"

(Li malfermis fotoalbumon.)

"Inter 'la okcent arahatoj' la bonzo, kiu frapas la ŝtonan steleon per sia kapo estas neniuj aliaj ol mi, via frateto. Jes. Mi eldiru mian intencon senĉirkaŭfrazo"

(Li prenis ŝtonon de la tero.)

"Mi truigos ĝin per mia fingro. Fang Shiyu (Fan Ŝiju) uzis du fingrojn dum mi uzis nur unu. Kiu estas Fang Shiyu?"

(La ĉirkaŭrigardantoj ekmurmuris pri tio.)

"Prave. Fang Shiyu estis laika disĉiplo de la Suda Ŝaolin-templo. Lin la tranĉiloj kaj lancoj ne povis vundi kaj mil viroj ne povis venki. Li ja vere estis eminentulo de la uŝuistoj en nia lando. Eble iu demandus, ke Fang Shiyu uzis du fingrojn dum vi nur unu, ĉu vi estas pli kapabla ol Majstro Fang? Ne. Mi ja devas truigi ĝin trifoje. Se mi ne povos fari tion unufoje, bonvolu pardoni min. Se mi ne povos truigi ĝin duafoje, lasu min provi ankoraŭfoje. Se mi ne povos truigi ĝin triafoje, mi ekzinigu mian malpliagan fratinton al vi. Haaj-haaj!" (La tono pli kaj pli altiĝis.)

"Ne maltrankviliĝu, gesinjoroj. Ne sufiĉas la esencaĵo en mia dantian-punkto. Tio ne gravas. Rigardu vi ĉiuj."

(Li levis grandan manĝskatolon kaj malfermis ĝin.)

"Kio estas tio? Tio estas medikamento el pira kremo. Nu, mi manĝu duonpecon."

(Li maĉis kaj englutis.)

"Eble vi demandas, por kio utilas tio. Mi ne kaŝos tion de vi. Mia prapraavo estis la palaca kuracisto por imperiestroj. Tiu maljunulo inventis ĝin post eksperimentado de kelkdek jaroj. Pro kio Lia Imperiestra Moŝto Kangxi (Kangŝji) vivis tiel longe? Pro kio Lia Imperiestra Moŝto Yongzhen (Jonĝen) estis tiel eksterordinara pri luktarto? Ĉio dependis de ĝi. Nu, mi ne babilaĉu plue. Mi ja devas unue truigi la ŝtonon. Haj, Haaj--! (La tono pli kaj pli altiĝis.) Jen mi jam truigis duone!"

(Ekaŭdiĝis murmuro el la ĉirkaŭrigardantoj.)

"Kio? Mi scias, ke vi malpacienciĝas por informo pri la medikamento el pira kremo. Ne malpacienciĝu. Lasu min, vian frateton, diri al vi malrapide. Por kio finfine utilas tiu ĉi medikamento? Ĉiuj onkloj, se vi suferas de nokta anhelado kaj malfacila spirado, senĉesa tusado, malforteco kaj malvigleco, tio ne gravas. Manĝu ses pecojn, kaj en nur unu kuracperiodo juneco revenos al vi, kaj vi ja povos eĉ generi idojn dum via maljunueco. Ĉiuj fratoj, se vi suferas de nokta ŝvitado kaj kutima polucio, kaj malplezura sekskuniĝado, tio ne gravas. Manĝu ok pecojn kaj vi kontentiĝos pri via fortikeco kaj ĉiunokta seksĝuado. Ĉiuj onkloj kaj fratinoj, se vi suferas de troa blankelfluo kaj sangellaso, menstrua malreguleco, kaj negravedeco, tio ne gravas. Manĝu dudek kvar pecojn. En nur sep kuracperiodoj vi resaniĝos kaj ĝuos vian kontentiĝon. Bone, lasu min daŭre truigi la ŝtonon. Tio estas la lasta fojo."

(Rigardanto krietis.)

"Ho, gesinjoroj, tiu ankoraŭ volas informiĝi pri la medikamento el pira kremo. Kion mi faru laŭ vi? Bone. Kiel proverbo diras, montoj ne moviĝas, dum nenia akvo ne fluas. Kian hazardon ni havas renkontiĝi ĉi tie. Ĉar vi ĉiuj subtenas mian ludadon, mi do malkaŝu min al vi. Al la demando, kiom kostas ĉiu peco, mi devas diri pardonon. Ĉar

ĝi estas senpreza valoraĵo, kiun vi ne povas aĉeti je ajna prezo. Hodiaŭ anstataŭ elvendi mi nur disdonacas. Se mi vendos ilin, tio ja signifas, ke mi forvendos mian maljunan patrinon. Tiuj volas la medikamenton, levu la manon."

(Ne malmultaj homoj levis sian manon.)

"Bone, tamen ĉi tie estas iuj malsinceraj nur por trompi. Ne kredas pri tio? Bonvolu demandi tiun ĉi amiketon."

(Li perfingre montris knabon ĉirkaŭ dek jaran.)

"Por kio vi petas ĝin? Ho, kuraci malsanon por via patrino. Bone. Mi postulu de vi pagon. Pagu al mi kvindek cendojn. Ne havas? Iru prunti. Bone, bone. Ne plu iru prunti. Pro via fideleco al via patrino mi donacu al vi pecon senpage. Ankaŭ mi estas fidelemulo. Bonvole respondu al mi, knabino."

(Li montris junulinon.)

"Vi ja aspektas tute sana, por kio vi petas la medikamenton? Ho, por via fratino. Bone, vi devas pagi dek jŭanojn."

(La junulino heziteme donis al li dek jŭanojn.)

"Bone. Pro via amo al via fratino, mi redonu al vi la monon kaj donacu la medikamenton senpage. Nu, ĉiuj amikoj petantaj la medikamenton, kaŭriĝu. Ha, mia ĉielo! Tiel multe. Unu, du, tri, eble ĉirkaŭ cent homoj. Do mi tiel agu. Mi pruvu, ĉu vi estas sinceraj. La sinceraj elprenu monon. Vi, (Li montris knabinon,) ĉu vi ne domaĝas tri jŭanojn? Donu ĝin al mi. Ĉu vi pentos aŭ ne se mi ne redonos la monon al vi? "

(La knabino pensis, ke li certe redonos la monon, kaj kapsignis) "Bone. Jen la medikamento. Vi, (Li montris junulon.) Ĉu vi ne domaĝas tri jŭanojn? Donu ĝin al mi. Ĉu vi pentos aŭ ne, se mi ne redonos ĝin al vi? "

(La junulo pensis, ke li certe redonos, kaj malavare svingis sian manon.)

"..."

"Bone. Dankon por la helpo de vi ĉiuj. La monon por la medikamento mi akceptas. Mia humila hejmo estas la sepa domo oriente ĉe la kvardek-sepa kurbiĝo de la granda rivero en la malsupera baseno en la vilaĝo A, Subdistrikto B, Gubernio C, Provinco Ĉ. Se vi trovos, ke la medikamento ne povas elradikigi malsanon, skribu aŭ venu persone al mi. Ĝis revido, gesinjoroj."

(Li metis la monon en la skatolon, en kiu antaŭe li tenis medikamentojn, ĝentile riverencis kaj foriris.)

(La homamaso disiĝis post longa momento. Ili zorgeme metis la medikamenton en mansakon aŭ poŝon, diris nenion unu al la alia kaj foriris en silenta kompreno. La loko fariĝis deove malplena.)